

Ŝanĝproponoj por diskuto**karg/o** (forigi la ekzemplon „*transŝarĝi kargon*”)**kargisto** Homo, kies metio estas transporti **kargojn****elkargi** Elporti **kargon** de transportujo: *elkargi barelojn el vagono*; ...**enkargi** Enporti **kargon** al transportujo**transkargi** Transporti **kargon** de unu transportujo al alia**ŝarĝ/o 2** Pezaĵo transportata de veturilo

(viŝi ĉion de „ŝarĝisto”, „elŝarĝi” kaj „transŝarĝi”)

**5. Ĉu „puŝadi” aŭ „ŝovi”?**Problemo

Se trakciilo troviĝas antaŭ la veturigataj senmotoraj vagonoj, ni uzu la verbon „treni” kiel specialaĵon de „tiri”. Se trakciilo troviĝas malantaŭe, taŭgas nur la verbo „puŝadi”, ĉar „puŝi” koncernas dummomentan agon (forpuŝi en ranĝadstacio), kaj „ŝovi” sole rilatas al glitiga movo. Pro tio en *Poznań* ni decidis la terminojn 05226 „lokomotivo helpuŝada” kaj 05229 „lokomotivo trajnfina nepuŝada” (TeKu 133, 134). Tamen mi ne tute kontentas pri la koncerna PIV-solvo, eble ankaŭ sub influo de la germana lingvo. Sekve mi proponas pripensi nocian adapton de la verbo „ŝovi” al enhavo de „treni”, por uzi ĝin en trakcia senco.

Enhavo de nuna PIV**tir/i** (tr) **II-7** Movi kun si aŭ post si kun pli-malpli granda peno, irante antaŭen: ...;(speciale, pp veturilo) *la veturilon tiris du bovoj*; ...**tren/i** (tr) **1** Tiri post si ion kun malfacilo pro ties pezo aŭ frotiĝo sur la grundo**2** (pp veturilo) Tiradi post si: ...; *ĉareto trenata de aŭtomobilo***puŝ/i** (tr) **1** Per forta movo, premo aŭ frapo, forigi aŭ peni forigi de la okupita loko: *puŝi veturilon*; ...; *puŝi pordon per la piedo*; ...

...

**puŝado** Daŭraj aŭ ripetaj puŝoj**ŝov/i** (tr) **1** Puŝi objekton, glitigante ĝin sur la surfaco, sur kiu ĝi kuŝas**2** Pli-malpli krude aŭ malorde iun penetrigi, enpuŝiŜanĝproponoj por diskuto**puŝ/i 1** (forigi la ekzemplon „*puŝi veturilon*”)**ŝov/i** (tr) **1** Puŝadi objekton, glitigante ...**2** (pp veturilo) Puŝadi antaŭ si: *lokomotivo ŝovas vagongrupon al kargadtrako*.**3** Pli-malpli krude ...

Jeskaze estos preferinde, ŝanĝi la terminojn 05226 kaj 05229 de „lokomotivo ...puŝada” al „lokomotivo ...ŝova”. Tamen mi iom dubas, ĉu ĉi tiu PIV-korektaĵo vere estas rekomendinda. Kiel vi opinias?

Bonvolu pripensi, ĉu taŭgas ankaŭ aliaj solvoj en la PIV-revizio. Eventuale vi trovas ankaŭ aliajn reviziindajn nociojn.

Ĝis sekva korespondaĵo aŭ ĝis la kunsidoj en Sofio afable salutas

*Heinz Hoffmann.*

# Terminara Kuriero

TeKu 138

Marto 2010

**Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF**

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 261319 Retadreso: niemann@cablemail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul


Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablemail.de

**Forpasoj**

4-an de Novembro 2009 forlasis nin *Per Johan Krogstie*, naskita en 1929. Dum sia tuta profesia vivo li estis fervora fervojisto en pluraj funkcioj, interalie direktoro de la fervojmuzeo en *Elverum* kaj poste en *Hamar*. *Per Johan* estis unu el la motoroj de Norvega Fervojista Esperanto-Asocio, aranĝis multajn IFEF-eventojn. Ĝisfine terminara laboro interesis lin. En 2007 IFEF estigis lin Honora Membro.

Ankaŭ fine de 2009 forpasis *Anna Poláková*, naskita en 1934. Ŝi esperantiĝis jam en 1959, estis multjare tre aktiva membro de la ĉeĥa landa asocio en IFEF kaj de Esperanto-movado en *Lanškroun*. Kiel edzino de nia aktiva terminara kunlaboranto *Zdeněk Polák*, *Anna* fidele helpis lin.

Ni gardas la memoron pri la entuziasma agado de ambaŭ forpasintoj. Ili ripozu en paco.

**Karaj gekolegoj,**

post 2 monatoj estos jam denove kongrestempo. Al solvo de lastaj terminaj taskoj kontribuis 6 kunlaborantoj, nome *Heinz Dieter Hartig*, *Zlatko Hinšt*, *Erik Mortensen*, *Jan Niemann*, *Henning Olsen* kaj *Zdeněk Polák*. Jen la ĝisnuna rezulto, kiom da kolegoj preferas kiun terminon por kiu listigita nocio en TeKu 137, paĝoj 3 – 6:

**00789** kvarfoje tempo antaŭ retroveturo, dufoje turnotempo retrovetura**01926** trifoje kondukotubo de dukondukila bremsa, dufoje kondukotubo bremsaera suplementa**02279** kvarfoje retrovetura procedo, unufoje turno retrovetura**04288** kvinfoje glitado (bremse blokitaj radoj)**06150** kvinfoje ruliĝgvidado (de trakciradoj)

**06936** kvinfoje **ruliĝgvidado**

**11895** kvarfoje **rotaciĝlitado**, unufoje **turnoĝlitado**

**12030** kvarfoje **trakciadadhero**, unufoje **trakciadadhereco**

**12055** trifoje **tempo veturiltransira**, dufoje **tempo veturilŝanĝa**, unufoje **tempo trafikilkoresponda**

La decido okazos en Sofio. Kiu tie ne partoprenos, sed ankoraŭ volas diri sian opinion, bonvole skribu aŭ tajpu al mi antaŭe.

## Sekva revizio de PIV

En Novembro 2009 mia terminara kolego de TAKE (konstruistoj) *Jan Werner* informis pri invito de PIV-redaktoro, partopreni en sekva aktualigo de PIV, kiu povus reeldoniĝi post tri jaroj. Jam dum lastaj jaroj mi notis plurajn koncernajn temojn. En ĉi tiu TeKu la sekvaj PIV-nocioj estas la solaj novaj taskoj.

### 1. La termino „radiofonio”

#### Problemo

Anstataŭ „radiofonio”, laŭ PIV estas preferinde uzi la terminon „radiotelefonio”. Telefonio koncernas sole transsendon de sonoj. Sed en grava amplekso estas sendataj ankaŭ aliaj informoj, ekzemple por telefunkciigi aparatojn, telekonduki veturilojn ktp. Sekve necesas doni al la termino „radiofonio” novan difinon.

#### Enhavo de nuna PIV

**radiofon/io** = radiotelefonio

**radiotelefonio** Telefonio I, uzanta elektromagnetajn ondojn

**telefonio 1** Sistema de transsendo de sonoj je distanco per elektraj kurentoj aŭ ondoj

#### Ŝanĝpropono por diskuto

**radiofon/io** Sistema de sendrata transsendo de informoj, birado aŭ sondado, uzanta elektromagnetajn ondojn

### 2. La radiko „mobil-”

#### Problemo

La internacie vaste konata radiko „mobil-” havas en PIV nur unu negravan signifon. Temas pri la rara artaĵo „mobilo”. Por esprimi la malon de „lokfiksa”, eblas uzi nur la adjektivojn „movebla” aŭ „translokebla”. Ŝajnas avantaĝe enkonduki novan adjektivon „mobila” per difino kun taŭga aldona karakterizaĵo.

#### Enhavo de nuna PIV

**mobil/o** Artajo el plaketoj, ekvilibre pendantaj de drato kaj turniĝantaj laŭ la aermovoj

**Ŝanĝpropono por diskuto:** Ĉu „diversloke funkciebla” estas plej bona aldonaĵo?

**mobil/a** Translokebla kaj diversloke funkciebla: mobila radiofonio

**mobilo** Artajo el ...

### 3. La verbo „movi”

#### Problemo

La verbo „movi” havas en PIV tri signifojn: Ekster la transloka kaj instiga signifoj, temas pri pozicioŝanĝo sole de vivantaj estaĵoj. Kontraste al tio, la substantivo „movo” laŭ PIV inkludas ekzemple artikigitajn pecojn. En tekniko estas bezonata ankaŭ la verbo por nomi pozicioŝanĝon de senvivaj objektoj.

#### Enhavo de nuna PIV

**mov/i** (tr) 1 Transigi objekton en alian lokon

2 Ŝanĝi la pozicion de membro aŭ korpoparto

3 Instigi, agigi

**movo 1** Ĉiu aparta ŝanĝo de loko, pozicio aŭ stato: ...; *la movoj ... de artikigita peco; ...*

**movebla** Tia, ke oni povas ĝin movi

#### Ŝanĝpropono por diskuto

**mov/i 2** Ŝanĝi la pozicion de membro aŭ korpoparto, aŭ de artikhava, fleksebla aŭ turnebla objekto

### 4. La verbo „kargi” kaj ties rilato al ŝarĝo

#### Problemo

La transitivaj verboj „kargi / malkargi” celas al transportujo, ne al transportota / transportita objekto (= kargo). Ĝis nun malfacilas trovi taŭgan verbon por esprimi elmeton, enmeton, transmeton ktp de kargo. La PIV-solvoj „elŝarĝi” kaj „transŝarĝi” ne estas ekzaktaj, ĉar ŝarĝo koncernas pezon kaj ankaŭ celas al transportujo. En *RailLexic* jam troviĝas 17 terminoj „transkarg-”. Pro tio ni pripensu, ĉu la verboj „elkargi”, „dekargi”, „enkargi”, „surkargi” kaj „transkargi” taŭgas por celi al kargo.

#### Enhavo de nuna PIV

**karg/o** Tuto de la objektoj en unu transportujo (ŝipo, vagono, kontenero, kamiono k.a.): ...; *transŝarĝi kargon; enpaka, loza kargo; ...; kargo-trajno, ...*

**kargi** (tr) Ŝarĝi transportujon per kargo

**malkargi** Malŝarĝi kargitan transportujon

**ŝarĝ/o 1** Tuto de pezaj objektoj, portataj de iu

2 Tuto de varoj, transportataj de veturiloj

3 Forto, estigata de surmetita maso, kaj efikanta sur ian parton de konstruaĵo

4 (f) Io peniga, kion oni trudas al iu

**ŝarĝisto** Homo, kies metio

estas transporti ŝarĝojn

**elŝarĝi** Elporti ŝarĝon de iu loko al alia: *elŝarĝi barelojn el vagono; ...*

**transŝarĝi** Transporti la ŝarĝon de unu veturilo en alian



Ĉu transŝarĝado aŭ transkargado ?